# HEROLDO DE ESPERANTO

**Eldonanto:** Belga Esperanto-Instituto, K.S., Antwerpen, Belgujo.
**Redaktoro:** Teo JUNG.
**Adreso de la Redakcio-Administracio:** Harstenhoekweg, 223, Scheveningen. Nederl. — Al informpetoj aldonu resp.-kuponon!

OFICIALA SEMAJNA ORGANO DE INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

**Abonprezo** (*antaŭpage*): tutjara abono Bfk. 108,— (Hfl. 6.80) aŭ egalvaloro en alia valuto; trimonata Bfk 27,— (Hfl. 1.70); unumonata Bfk. 10,— (Hfl. 0,60). *Ĉiu abono povas komenciĝi nur en la komenco kaj finiĝi nur en la fino de iu monato.* — Internacian poŝtan respondkuponon ni akceptas po Hfl 0.12½.

**Anoncoj:** unumilimetra kolonero (62 mm. larĝa) kostas Bfk. 1,— (Hfl. 0,06).
**Anoncetoj** (*nur antaŭpage*): ĝis 20 vortoj aŭ mallongigoj Bfk. 10,— (Hfl. 0,60); por ĉiuj pliaj 10 vortoj komencitaj Bfk. 5,— (Hfl 0,30) pli.

**Pagojn** kaj ĉiujn korespondaĵojn, manuskriptojn ktp. direktu ekskluzive al *Heroldo de Esperanto* (Teo Jung), Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando. — Ne presitajn manuskriptojn ni resendos, se respondkupono estis aldonita.

N-ro 19 (975) — DEKNAŬA JARKOLEKTO — 15 Majo 1938.


# Ĉu "Esperanto nedezirata ?"

## Instrua fakto

### Pri la angla-itala interkonsento la franca teksto grave diferencas de la angla.

En la gazeto de Paris: « Le Matin », troviĝas la sekvanta artikolo pri la protokolo de la kunsido de la anglaj kaj francaj ministroj, kiu ĵus okazis en London:

« ... Pri la anglo-itala interkonsento la angla teksto estas: **„ The french ministers welcomed this contribution to European appeasement... "**, kies traduko devus esti: „ Les ministres français ont considéré comme la bienvenue cette contribution à l'apaisement européen "; dum la franca teksto estas: **„ Les ministres français ont approuvé cette contribution... "** Sekve la angla teksto estas pli varma ol la franca. »

Pli grava ol tiu nuanco estas la diferenco inter la tekstoj, ĉar, laŭ la franca teksto, ŝajnas, ke la francaj ministroj rajtus aprobi aŭ malaprobi agon de la angla registaro; dum la angla teksto diras nur ke ili plezure konstatis tiun agon. Feliĉe la angloj ne komprenas la francan tekston, kiu povus prave ofendi ilin.

« ... Pri la centra Eŭropo, la angla teksto parolas nur pri la ago entreprenota, ... por trovi bazon (**find the basis**) de paca kaj justa solvo de la problemoj ekzistantaj en tiu regiono, dum la franca teksto parolas pri certigado de tiu solvo (assurer la solution)... »

Do la anglaj ministroj serĉas la solvon, dum la francaj, kiuj trovis ĝin, opinias ke ĝi devas esti aplikata.

En la du temoj estis miskompreno malgraŭ ĝisfunda deziro interkompreniĝi; kvankam negrava, ĝi pruvas utilecon de Esperanto, kiu nur povas forigi tiujn, danĝerajn en eblaj okazoj, erarojn, en la diplomataj kunsidoj.

Rollet de l'Isle.

*

### Angla universitata profesoro skribas al pola scienca revuo pri sia sperto en internaciaj kongresoj.

Grava revuo « Organon », internacia revuo dediĉita al la « Scienco de la Scienco », eldonata de la Instituto Mianowski por Kuraĝigo de Sciencaj Laboroj en Varsovio, sendis antaŭ unu jaro demandaron pri la organizo de internaciaj kongresoj al multaj spertuloj en diversaj landoj. La respondoj estas nun publikigitaj en la revuo (volumo II, 1938, paĝoj 133-236). Post la demandoj precizaj oni invitis notojn pri la ĝenerala aranĝo. La sekvanta citaĵo estas respondo al tiu invito, sendita al la nomita revuo de s-ro C. B. Fawcett, « Professor of Geography, University College », Londono. Ni represas ĝin kun ĝia esperantlingva traduko.

My experience of a number of international congresses, in geography and kindred subjects, has convinced me of the futility of multilingual discusions. Too few mem are sufficiently at home in a foreign language to be able to use it effectively in the quick give-and-take intercourse of a vigorous discussion. So in practice a multilingual discussion usually degenerates into a number of distinct, and often not very closely related, contributions to the topic.

This opinion is fortified by a comparison with unilingual congresses, in Britain and in the United States, where I have experienced valuable and vigorous discussions.

Hence I would suggest that organizers of international scientific coöperation should study the possibilities of an agreed common language for congresses. It is obviously impossible, in the nationalistic world of today, to give such a status to any one national language. An acceptable common language for scientific intercourse must be a neutral language, the one effective language in this category is Esperanto. I have made some study of it with this purpose in mind; and I am convinced that it merits the serious attention of all who wish to forward intellectual co-operation among the several peoples of the world.

*

(Traduko:)

Mia sperto en multaj kongresoj internaciaj, pri geografio kaj najbaraj fakoj, min konvinkas pri la senutileco de diverslingvaj diskutadoj. Iometo da homoj scipovas fremdan lingvon sufiĉe bone por uzi ĝin kompetente dum la viva interŝanĝo de vigla diskutado. Tial, fakte, diverslingva diskutado ĝenerale iĝas grupo da apartaj, kaj multokaze ne tre rilataj, kontribuaĵoj al la temo.

Tiu ĉi opinio estas fortigita de komparo kun unulingvaj kongresoj, en Britlando kaj Usono, en kiuj mi spertis valorajn kaj viglajn diskutadojn.

Tial mi volas sugesti al organizontoj pri kooperado internacia scienca ke ili studu la eblon de unu konsentota komuna lingvo por kongresoj. Evidente oni ne povas, en la hodiaŭa mondo naciisma, doni tian rangon al iu ajn nacian lingvo. Komuna lingvo akceptebla al scienculoj devas esti neŭtrala lingvo. La sola efektiva lingvo en tiu ĉi kategorio estas Esperanto. Mi iom studis ĝin, pensante pri tiu ĉi celo; kaj mi estas konvinkita ke ĝi indas la seriozan atenton de ĉiuj kiuj deziras antaŭenhelpi la kooperadon intelektan inter la diversaj popoloj de la mondo.

*

### Komplika procedo ĉe litovaj-polaj traktadoj.

Litova samideano sendis al ni eltondaĵon el ĵurnalo « XX Amzius », n-ro 96 (551) de 30.4.1938, kun traduko de jena paragrafo pri la litovaj-polaj traktadoj:

En Kaunas laboradis du litovaj-polaj komisionoj: a) pri poŝta, b) pri telefona, telegrafa kaj radia komunikado. Oni interkonsilis preskaŭ ekskluzive france kaj, de tempo al tempo, estis uzataj germana kaj rusa lingvoj. La 30-an de aprilo la komisionoj trarigardis la france skribitajn tekstojn kaj tradukis ilin litoven kaj polen.

*

**Gesamideanoj, ni intencas, al la rubriko: Ĉu « Esperanto nedezirata »? provizore doni konstantan lokon en nia gazeto, kondiĉe ke vi liveru al ni sufiĉe da materialo. Kiel ni klarigis en n-ro 17, en tiu rubriko ni intencas publikigi faktojn kiuj evidentigas la nepran dezirindecon de internacia helpa lingvo. Tiuj faktoj liveru al niaj propagandistoj kaj fervoruloj pliajn armilojn por ilia batalo. Esploru do en viaj naciaj jurnaloj kaj revuoj, ĉu vi tie ne trovas ian mencion pri malfacileco de interkompreniĝo pro lingvaj kaŭzoj! Kontrolu diverslingvajn prospektojn pri miskompreniaj aŭ eĉ ridigaj eraroj! Sed, ni petas: NUR FAKTOJ! Indiku la fontojn, kie vi trovis la koncernajn komunikojn! Ankaŭ el via propra sperto rakontu, sed mallonge!**

Konata profesoro, amiko de Esperanto:

# Ernst Felix Petritsch 60-jara

Prof. Inĝ. E.F. Petritsch, kiu estas korifeo en sia fako (elektra tele-komunika tekniko) kaj prezidanto de la terminologia komitato de la Aŭstria Normiga Komitato (OeNA), fariĝos la 21-an de majo 60-jara. Je tiu okazo ankaŭ nia redakcio (kaj ni kredas ke ĉi-kaze ni povas diri: en la nomo de la esperantistaro) esprimas al la estimata profesoro niajn korajn gratulojn kaj bondezirojn. La 18.4.1934 Prof. Petritsch faris, en la kadro de la Esperanto-servo por la eksterlando en Wien, radio-paroladon pri « Lingvonormigo per Esperanto en scienco kaj tekniko », kaj ankaŭ « Heroldo de Esperanto » povis en la jaro 1935 (n-ro 46) publikigi artikolon de li.

Ĉi-sekve ni publikigas artikolon, afable disponigitan al ni de nia konata samideano kaj kompetentulo sur lingvonormiga kampo, D-ro Eugen Wüster.

Unu el la plej aktivaj komitatoj de la Aŭstria Normiga Komitato estas la komitato por terminologio. Kaj unu el la plej aktivaj membroj de tiu komitato estas ĝia prezidanto, Prof. Inĝ. E.F. Petritsch.

La 21-an de majo, la membroj de la terminologia komitato respekte kaj dankeme memoros sian prezidanton, kaj kun ili multaj aliaj homoj en kaj ekster la nova Germana Regno. Ĉar en tiu tago plenumos pionira inĝeniero, multvojaĝinta pensulo kaj naturamiko, granda kaj helpema homo la sesan jardekon de sia fruktodona vivo.

La eksteraj epokoj de lia vivovojo estas rapide denombrataj : edukiĝo ĉe gimnazio en Trieste, poste ĉe la Teknika Altlernejo kaj ĉe la Universitato en Wien. De tiam influa kunlaborado ĉe la planado kaj evoluigado de la elektraj interkomunikaj retoj de Aŭstrio (1900-1919) kaj Nederlando (1920-1927). Ekde 1928 regula profesoro ĉe la Teknika Altlernejo Wien ; kreado de la Instituto por Telekomunika Tekniko, la plej grandmezura tiuspeca instituto en Eŭropo.

Sed la laboroj kaj mondbildo de Petritsch ne haltis ĉe la evoluigo de unuopaj teknikaj instalaĵoj ligitaj al difinitaj materialo kaj loko. « Pli kaj pli klare evidentiĝas, ke la tuta teknika informa rimedaro, komencante de la presarto, skribmaŝino, fotografio, ĝis la gramofono, sonfilmo, telegrafio, telefonio, radiofonio, telefotado kaj televizio formas grandan unuecon. Ĉiujn ĉi teknikajn kampojn oni povas trakti laŭ la samaj vidpunktoj, ili reciproke sin fekundigas, transiras unu en la alian. Tiuj ĉi novaj interkomunikaj rimedoj, kiuj ebligas, ĉion videblan kaj aŭdeblan transporti je laŭvolaj distancoj kaj al laŭvolaj lokoj, estas la plej valora donaco de la tekniko al la homaro. Ĉar ili tuŝas la plej gravajn fundamentojn de la kulturo : la reciprokan interkompreniĝon de la homoj. »

Kaj do, kiel kreema servanto de la reciproka kompreniĝo inter la homoj, Prof. Petritsch estas ne nur la instruanto de generacio de telekomunikaj inĝeniero, ne nur la prezidanto (unua aŭ dua) de la « Urania » en Wien, de la societo por teknika popoledukado kaj de la Leo-societo, sed ankaŭ prezidanto de la OeNA-komitato por terminologio.

En multaj kunsidoj tiu ĉi komitato, de kelkaj jaroj, sekvas vastajn celojn : kunlabore kun samspecaj komitatoj en aliaj landoj estas fondota internacia difina verkego de la teknikaj-sciencaj difinoj, kaj por tiuj ĉi difinoj estas kreota unueca terminologio, ĉerpota el la komuna lingvotrezoro de l' okcidentaj popoloj. Kelkfoje la ondoj de l' opiniodiferencoj leviĝas tre alte, kaj iufoje interkonsento ŝajnis neebla. Sed hodiaŭ ni jam scias, ke sub la fak- kaj homsperta gvidado de Petritsch ankaŭ tiu ĉi fratproblemo de l' komunika tekniko iutage estos definitive solvita.

*E. Wüster.*

## La nunjaraj libertempejoj

Ankaŭ nunjare la nombro de lokoj, kiuj decidis aranĝi internaciajn libertempejojn esperantistajn, estas grandeta. Ni jam informis detalete pri la danaj : *Helsingór* kaj *Ry*, kaj ni jam publikigis anoncojn ankaŭ pri *Lázně Bělohrad*, la ĉarma kaj Esperantema ĉeĥoslovaka banurbeto. Intertempe ni ricevis informojn pri la nunjaraj aranĝoj en la *Arnhema Esperanto-Domo*, pri internacia semajno kaj perfektiga kurso en *Malo-les-Bains* (Francujo) kaj, laste, ni aŭdis ankaŭ pri esperantista somerrestadejo en *Budapest*, la « Reĝino de Danubo ». Krome, UEA projektas aranĝon de libertempo en *Brunnen* (Svislando).

Bedaŭrinde nia loko ne sufiĉas, por samtempe publikigi detalajn informojn pri ĉiuj aranĝoj. Ni do presas hodiaŭ nur informojn pri la aranĝoj en L. Bělohrad kaj Arnhem, en la venonta numero pri Malo, kaj same en la venonta (aŭ postvenonta) numero pri Budapest, — tio estas laŭ la vico, laŭ kiu alvenis ĉe ni la koncernaj informoj.

### La aranĝoj en L. Bělohrad.

En la « esperantista libertempejo » Lázně Bělohrad, kiu jam dum pluraj jaroj sukcesplene organizis amikan kunrestadon kaj diversajn kursojn, ankaŭ nunjare okazos (10.-24.7):

1. Kurso por progresintoj, dum kiu oni parolos nur Esperante.
2. Kurso por Cseh-metodaj instruistoj.
3. Elementa Cseh-metoda kurso.

La kursoj okazos en la salonego de la urba konsilantaro kaj estos gvidataj de la konata rumana samideano D-ro S. Pragano. Kostoj por plena 14-taga pensiono kaj kurzkotizoj de 600 ĝis 800 kronoj ĉeĥaj, eventuale malpli. Petu

## Unu Refuto ĉiusemajne

### *La kontraŭuloj asertas*

**ke Esperanto estas nebezonata, ĉar la homaro ĝis nun vivadis sen ĝi, kaj ĝi do povos ankaŭ estonte vivadi sen ĝi.**

**Fakte! Sed kiu kuraĝos ankoraŭ paroli pri progreso kaj kulturo? La homaro ĝis post la mondmilito vivadis ankaŭ sen radio, kaj ĝi do estus povinta vivadi sen radio same bone en la nuna tempo kaj en la estonteco. Niaj geavoj, kaj multies gepatroj, vivis sen aviado, eĉ sen aŭtomobilismo; do ankaŭ ni kaj niaj ididoj povus vivi sen aeroplanoj, eĉ sen aŭtomobiloj. Multaj el ni, estante infanoj, en nia urbeto aŭ vilaĝo ne konis elektron aŭ gason, nek telefonon, nek aŭtomobilon, — ni kapablis vivi perfekte sen ĉi ĉio. Sed nun?**

**Aklamante progreson, oni ne povas ne aklami ankaŭ la internacian helplingvon. Kiu volas kontraŭbatali Esperanton, tiu devas kontraŭbatali ankaŭ aviadon, aŭtomobilismon, kinematografion, radion, televidon, kaj entute ĉion kio levas la nuntempan homaron super tiun de la ŝtonepoko, aŭ, plie, kio levas la homon super la nivelon de besto.**

## Lernantoj de la popollernejo en la vilaĝo Poĉuta parolas Esperanton kaj aranĝas ŝakturnirojn

Sub la supra titolo aperis en la plej granda taĝjurnalo de Jugoslavio « Politika » en numero de 10.4.1938 jena artikolo:

« La rifojn de la montaroj Jablanika, Orlovica kaj Vilovica oni bele vidas el Valjevo, kaj ankoraŭ pli bele ili ĉarmigas sian blueblankan aspekton, kiam sur ili postrestas neĝo ankaŭ dum printempo.

La lernejaj infanoj el tiu ĉi montara regiono, la submontanoj el la patrolando de Ilija Birčanin venas el sep vilaĝoj, kaj ĉiutage pli granda nombro da ili trapaŝas 7-8 km., kaj kelkaj eĉ po 10. La infanoj estas serenaj, gajaj kaj eksterordinare inteligentaj tiel, ke en la instruado ili montras bonajn rezultatojn.

Ili povas sin vere laŭdi, ke ili estas la solaj popollernejanoj (!) en la lando, kiuj konas la internacian lingvon Esperanto kaj ŝakon. En la unua klaso la plimulto de la etuloj ellernis nombri en Esperanto ĝis 100, kaj kelkaj je demandoj de tre agema instruisto s-ro Mihailo Petrović scias en Esperanto adicii kaj subtrahi en amplekso de la nombro 30. Krom tio ĉi kelke da etuloj-ĉefuloj ĝojas, ke ili ellernis kaj scias kelkajn pli facilajn frazkonstruojn.

Kiel aspektas tio? Kampara lernejo (nenio eksterordinara: lernejo kun benkoj sub la serena ĉielo), 67 lernantoj kaj lernantinoj de la unua klaso rapide kaj gaje preparas sin por komenci — post la oficiala instruprogramo — la horon de Esperanto. Tagmezo. La milda printempa suno kvazaŭ ridetas de supre, de sur la montaro Vilovica.

— Ĉesu manĝi, Mitro! admonas la instruisto s-ro Petrović unu etulon.

— Kiom estas kvar kaj kvin? li direktas la unuan demandon ĝuste al Mitro. Kaj dum la plimulto levas du fingrojn, Mitro ne konfuziĝas:

— Kvar... kvar kaj kvin estas naŭ, unu, du, tri, kvar, kvin, ses... nombras Mitro.

— Tre bone, tre bone...

— Ĝis la kvara klaso ni estas jam malproksime, sed kia utilo el tio, se pli poste, ĉe plugilo kaj ĉe ŝafoj kaj kaproj, oni forgesas Esperanton? diras la instruisto.

La pasintan jaron la infanoj el Poĉuta ekspozis siajn desegnaĵojn en Valjevo. En la ejoj de Valjeva popollernejo tiu ĉi eksterordinara ekspozicio kun la plej junaj ekspozantoj daŭris du tagojn. Sub la infanaj desegnaĵoj staris tekstoj de sinceraj infanaj rimarkoj: « Lupoj en nia vilaĝo », « Mia patrino melkas kaprinon », « Nia lernejo », « Ĝendarmoj en la vilaĝo », « Mia patro fendas arbon ».

La ŝakaj turniroj, kiujn aranĝas la infanoj el sub montaro Jablanika kun helpo de instruisto Petrović, estas konataj nur en tiu ĉi regiono. »

Tiom la ĵurnalisto de la « Politika » kaj la instruisto Petrović. Ni aldonas: se la legantoj opinias, ke tiuj malgrandaj vilaĝanetoj-esperantistoj ne darfas forgesi Esperanton, tiam oni devas doni al ili instigon, ligi ilin kun la Esperanto-movado, por ke ili ankaŭ poste restu esperantistoj. Tion ni povas atingi, se tiuj junaj esperantistoj ricevo el la tuta mondo ne nur multnombrajn salutleterojn (ĉar ankaŭ ili estas multnombraj), sed ankaŭ diversajn etajn donacojn kaj propagandajn Esperantaĵojn. Salutu ankaŭ nian tre ageman instruiston! Certe la infanoj estos tre kontentaj kaj feliĉaj kaj ankaŭ « pli poste, ĉe plugilo kaj ĉe ŝafoj kaj kaproj », ne forgesos Esperanton. Adreso: S-ro Mihailo Petrović, uĉitelj osnovne škole, SELO POCUTA, srez Valjevo, Drinska b., Jugoslavio.

Aleksander Turkovič.

---

prospektojn kaj detalojn de: **Esperantista Klubo, Lázně Bělohrad, Ĉeĥoslovakio.**

**La aranĝoj en Arnhem**

estas pli ampleksaj, kaj la pli multaj el ili okazos sub persona gvidado de pastro Andreo Cseh. La Esperanto-Domo kuŝas en bela parko, kaj ĝia hotelo por 50 gastoj estas instalita kun ĉiu moderna komforto. En la Esperanto-Domo estas aranĝataj studaj kaj amuzaj kunvenoj, kaj agrablaj ekskursoj al la belega **ĉirkaŭajo.**

**La Esperanto-Domo en Arnhem estas la sola vera Esperanto-hotelo en la tuta mondo, kie ĉio: la domo, la estroj kaj la gastoj, do la tuta medio, estas vere esperantista.** La esperantistaro povas fieri ke io tia en nia movado ekzistas, kaj ĝi devas partopreni en la klopodoj ke tiu unika entrepreno restu konservota kaj prosperu. Okazos la jenaj aranĝoj:

1. Kurso pri Esperanta literaturo, 27.-29.7. Gvidos S. Pragano. Kotizo 4 gld.

2. Vizito de dana karavano, 30.7.-8.8. La karavanon aranĝos H. Grónborg, Rosenvej 8, Risskov, Danlando, de kiu oni povas ricevi pli detalajn informojn.

3. Seminario por Cseh-metodaj instruistoj, 1.-6.8., kun prelegoj de A. Cseh, konsiloj al instruantoj, praktikaj prov-ekzemploj, raportado pri spertoj, diskutado, provlecionoj. Kotizo 6 gld., familiano 4 gld.

4. Ekzamenoj por Cseh-metodaj instruistoj, 6.8. La sukcesintoj ricevos specialan diplomon. Kotizo 5 gld.

5. Internacia perfektiga kurso, 8.-13.8. Gvidanto: A. Cseh. Kotizo por ĉiuj lecionoj, prelegoj kaj amuzaj aranĝoj 6 gld., familiano 4 gld. Komuna kotizo por seminario kaj perfektiga kurso 10 (6) gld. Specialaj favoroj por PTT-istoj kaj geinstruistoj.

6. Esperanto-kurso por komencantoj, 15.-20.8. Gvidanto: A. Cseh. Kotizo 6 gld., familiano 4 gld. Favoroj por PTT-istoj kaj geinstruistoj.

Ĉiuj kursoj, prelegoj kaj amuzaj aranĝoj okazos en la Esperanto-Domo. La kursanoj povos loĝi en la hotelo de la domo mem: ĉambro kun tri manĝoj gld. 3.50, 3.— aŭ 2.—, servmono 10 %. Adreso por aliĝoj kaj petoj pri pli detalaj informoj: **Cseh-Instituto de Esperanto, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando**

---

Jozefo Majo:

# EL ŜAKLANDO...

Post la travojaĝo de la terglobo kiun mi parte rakontis en Heroldo siatempe, mi volas raporti hodiaŭ pri kelkaj aventuroj, spertoj kaj observoj, kiujn mi notis dum mia vagado en la regionoj de ŝaklando. Por forigi ĉiun dubon, mi tuj klarigas, ke temas pri la 64 blankaj-nigraj kvadratoj de la ŝaktabulo, sur kiuj batalas oficiroj kaj soldatoj de du imagaj armeoj. Tiuj el la legantoj, kiuj ne estas intensaj ludantoj, eĉ ne imagas la amason da pasio kaj cerba energio kiu troviĝas sur tiu ĉi kampo. Iuj diras, ke la ludo akrigas la intelekton; aliaj asertas, ke ĝi estas pura tempoperdo. Pri tiuj juĝoj mi ne okupiĝos: la ŝaka mondo ekzistas, ni ne perdu nin en teoriaj diskutoj.

Ŝako, kia ĝi estas hodiaŭ, estas la rezultato de longa historia evoluo. Tiu ĉi « ludo » estas preskaŭ scienco aŭ eble arto. D-ro Tarrasch, fama teoriisto, skribas pri ĝi kiel sekvas:

« Ŝako estas spaco de intelekta produktiveco, en tio konsistas ĝia plej granda ĉarmo. Intelekta produktiveco estas unu el la plej altaj ĝojoj — se ne la plej alta — de la homa ekzisto. Ne ĉiu povas konstrui ponton, verki teatraĵon, aŭ eĉ fari bonan humoraĵon. Sed en ŝako ĉiu povas, ĉiu devas esti intelekte produktiva kaj tiamaniere partopreni ĝian elitan ĝuon. Mi ĉiam iugrade kompatas tiujn kiuj ne konas ŝakon, same kiel mi kompatas tiujn kiuj ne konas la amon. Ŝako, kiel amo, kiel muziko, kapablas igi la homon feliĉa. »

Kompreneble, ne ĉiuj ludantoj havas tiel altan idealon pri la ludo kaj nur malmultaj el ili povas sufiĉe bone ludi por partopreni centprocente la ĝuon kiun ĝi kapablas doni. Sed eĉ inter mezaj ludantoj, en la rondo de kiuj mi multe moviĝis, oni povas noti strangajn ŝakfenomenojn.

Ŝako estas internacia ludo, oni ja ne bezonas paroli dum la ludo, krom la malmultaj necesaj teknikaj esprimoj. Tamen, en ludoj inter ordinaruloj oni aŭdas sufiĉe da rimarkoj: esprimoj de kolero, surprizo, plezuro, kritikoj, ktp. Tiaj rimarkoj povas esti erarigaj por la kontraŭulo kaj tial ili ne estas permesataj en ĉampionaj ludoj. Oni tuj kompreneos la kialon, se mi rakontos iom pri miaj ludoj kun s-ro B., ekskuracisto kaj borsisto en Budapeŝto (oni memoru pri la amasa elmigrado el iu lando kaj pri tio, ke kuracisto ne ĉie povas ekzerci sian arton, kaj oni ne miros pri tiu stranga profesioŝanĝo). Do, D-ro B. dronigas sian malplezuron pri la proza ekzisto en post-tagmanĝaj ŝakturniroj en iu kafejo kie kunvenas similaj individuoj. D-ro B. amas la ŝakon sed li havas unu malvirton: li neniam volas perdi. Por tiri sin el malfacilaj pozicioj, li aplikas psikologiajn armilojn kiaj sekvas:

Unu fojon D-ro B. volis oferi oficiron, ĉar tiamaniere li povis gajni la ludon. Por forigi la atenton de la kontraŭulo pri sia kombino, li longe pripensadis, movis figuron kaj kun aktora pozo ekkriis: « Ho mi malsaĝulo, nun mi perdis ĉevalon ». La malamiko nenion konjektante forprenis la oferitan figuron kaj... perdis la ludon post du movoj.

Alian fojon D-ro B. faris eĉ pli ruzan aferon. Li rimarkis, ke li gajnus la ludon, se li unue movus sian reĝon. Li tamen pensis, ke tia movo estus tro rimarkinda kaj oni sin defendus kontraŭ la plano. Li do faris eraran movon per iu figuro, kiu tute ne povis moviĝi. « Nun mi devas movi la reĝon kiel puno » — li diris kun vizaĝo plene seniluziiĝinta. Li tion faris, la malamiko nenion rimarkis, kaj la doktoro gajnis denove.

La antipodo de la doktoro estis s-ro O., mia angla amiko. Li estis perfekte trankvila kaj sennervigis la kontraŭulon per flegmaj rimarkoj, ekzemple:

« Vi ludas kvazaŭ loterio ». — « Kial? » oni demandis. « Nu, la loterio funkcias unu fojon ĉiu monato », li diris al la longe pensanta kontraŭludanto. La apudaj rigardantoj ridetis, la pensemulo konfuziĝis, faris eraran movon, kaj la katastrofo sekvis.

Okazis foje, ke s-ro O. gajnis ludon sed la kontraŭulo pruvis al la rigardantoj, ke li ankaŭ estus gajninta je la sekva movo. «Jen diferenco inter ŝako kaj ĉevalkonkurso », s-ro O. rimarkigis, « en la lasta ankaŭ la dua ĉevalo gajnas, sed en tiu ĉi ŝakpartio nur mi gajnis. » Oni ridis pri la ŝerco sed nur kelkaj komprenis la veran ironion: s-ro O. nomis la kontraŭulon ĉevalo sed ne sin mem.

Mia plej forta kontraŭulo estis japano... kiu ne sciis bone ludi. Li studis mian pensmanieron kaj profitis el la plej eta movo de miaj vizaĝmuskoloj. Komence mi batis lin kiel mi volis, ĉar mi havis teorian konon pri la ludo, sed iom post iom li gajnis superecon kaj fine mi ne plu povis bati lin — kvankam mi ĉiam batis tiujn kiuj estis pli fortaj ol li sed kun kiuj li ne tiel ofte ludis kiel kun mi. Rememorante pri tiuj ludoj mi pensas nun, ke la homa karaktero ankaŭ manifestiĝas sur la ŝaktabulo, kvankam tiu ĉi ludo estas « logika ». Mia iama japana kunludanto tion komprenis, same kiel — je pli alta nivelo— la fama ŝakmajstro Lasker, kies ludmaniero estas nomata « psikologia », ĉar li studis la lud-metodojn de siajn kontraŭuloj antaŭ turniroj kaj aplikis la plej malagrablan manieron al ili.

Oni diras, ke ŝako ne estas hazard-ludo sed oni ne sufiĉe komprenas, ke ŝako ankaŭ ne bazigas sur pura logiko. Efektive, la eblecoj de la 64 kvadratoj estas tiom vastaj, ke la homa cerbo ne kapablas travidi ilin, kaj oni perdiĝus en labirinto de senfinaj variaĵoj sen la helpo de la gvida intuicio. Ankaŭ en tiu ĉi kampo elmontriĝas do la leĝoj kiujn starigis Bergson pri intuicio.

Bona ekzemplo por tio estas la vivo de la iama mondĉampiono Capablanca. Kiam infano, li kutimis rigardi la patron kiu ŝakludis kun najbaroj en Kuba-insulo. Foje li rimarkigis, ke iu ludo gajnita de lia patro ne validas, ĉar en la mezo okazis erara movo de ĉevalo. La patro iom kolere diris, ke la infano eĉ ne scias la leĝojn de la ludo, kiel li povus memori pri eraro okazinta meze de la partio. Tiam la 5-jara Capablanca reludis la tutan partion kaj pruvis, ke eraro fakte okazis. « Se vi estas tiel lerta, batu min » — diris la patro. Ili ludis, kaj la infano facile gajnis. Neniam li perdis eĉ unu ludon en la insulo Kuba. Tiu ĉi historia fakto pruvas la vastan rolon de intuicio en ŝakludo, ĉar la infano ne havis teoriajn konojn pri ŝak-scienco kaj logika pensado neniel sufiĉus por travidi la komplikitajn kombinojn kiuj okazas en la ludo: tio estos klara al ĉiu ŝakludanto.

La plej lastaj studoj de ŝak-analizistoj montras, ke la leĝo de relativeco validas ankaŭ sur tiu ĉi kampo. Laŭ tiuj esploroj ŝako konsistas el tri elementoj: forto, spaco kaj tempo, el kiuj ĉiu povas esti transformata en la alian. Plie, la forto de la figuroj kaj eĉ tiu de la kvadratoj konstante ŝanĝiĝas en la daŭro de la ludo. Je ĉiu movo oni devas do konsideri la ŝaktabulon kiel apartan ŝakproblemon kaj oni devas tiel decidi pri la plej taŭga movo, — senrigarde al planoj antaŭe faritaj. Povas do okazi, ke la situacio postulas nekonvencian movon kiu kontrastas kun la ĝenerale akceptitaj praktikaj reguloj kiujn zorge sekvas la t.n. « kafejaj ludantoj ». Tian ludon oni nomas «pozicia» kaj ĝi estas praktikata de la nuntempaj majstroj de la arto.

*

La celo de la supra artikolo estas direkti la atenton de la legantoj de Heroldo al la nobla ludo. Lastatempe aperis artikoletoj pri ŝak-terminaro, kio montras, ke troviĝas jam ludantoj inter niaj vicoj. Tio ne estas mirinda, ĉar ŝako estas ludo esence internacia kaj intelekta, kvankam — ni konfesu — ne necesas multe da parolo por ĝin ĝui. Konsiderante tiun ĉi aferostaton, mi esperas, ke Heroldo donvolos dediĉi iom da spaco al aparta ŝak-kolono, almenaŭ de tempo al tempo. Mi ne pensas pri ŝakproblemoj (mato en du movoj) kiajn oni trovas en multaj naciaj gazetoj kaj kies presado estas multekosta pro la necesaj gravuraĵoj. Mi pensis pri interesaj artikoloj pri la teorio kaj historio de la ludo, foje por la ĝenerala publiko, foje por la ludantoj, kies celo estus direkti la ĝeneralan atenton al ŝako kaj interesigi la ŝakludantojn. Tiamaniere nia ŝakterminaro povus evolui kaj nia ŝak-stilo ankaŭ elformiĝus en la uzado. Se tiu ĉi artikolo elvokos tian interesiĝon flanke de la redakcio kaj publiko, mia celo estos plenumata.

Ĉiu ŝakludanto, kiu volus kunlabori, bonvolu turni sin al: Jozefo Major, Vörösmarty u. 34 b II/9, Budapest VI, Hungarujo.

---

## Esperantista letero el Suomio (Finnlando)

Estu tuj dirite, ke la Esperanto-movado dum pasinta jaro, almenaŭ kelkrilate, plivigliĝis en nia norda lando. En la jarkunveno de la Esperanto-Asocio de Finnlando oni konstatis ankaŭ, laŭ neperfektaj informoj, ke okazis almenaŭ 30 kursoj en lando. Novaj studocirkloj ekestis en la natursanatorio de Paimio, kie la direktoro planas devigan enkondukon de nia lingvo en sian lernejon por flegistinoj, kaj en la gejunula societo de Kalanti. Precipe la laboristaro eklernis nian lingvon diligente en Helsinki, Furku, Viipuri, Tampere, Pori, Kuopio ktp. Kristana Esperanto-Asocio de Finnlando eldonis ilustritan propagandan folieton kaj ilustritan leterpaperon, en kiuj oni atentigas pri la graveco de Esperanto por kristana misio. La leterpapero entenas bibliajn sentencojn dulingve. Esperanto-Societo de Finnaj Fervojistoj presigis beletan turisman propagandan koverton « Bonvenon al Finnlando ». Esperantista Societo de Uusikaupunki eldonis du presaĵojn: broŝureton « Dekses aktualaj kialoj por la rapida enkonduko de l' internacia helplingvo Esperanto », kiu estas dissendita al la plej gravaj institucioj, gazetoj, lernejoj ktp., kaj flugfolieton destinitan por la finna abstinularo. Tiu ĉi flugfolieto atentigas pri la graveco enigi nian lingvon en la batalon kontraŭ la internacia alkoholmovado.

Bulgara lektoro el Sofio, s-ro Ivan H. Krestanov, faris en pluraj urboj tre interesajn prelegojn pri sia belega lando, kaj estona esperantisto Eino Loorits gvidis du kursojn: en gejunula societo de Kullaa kaj en geknaba lernejo de Kokemäki.

Kiel prezidanton de EAF kaj tiun de la Instituto oni denove elektis konatan lingviston. Prof. G. J. Ramstedt el Helsinki.

Plej laste tamen la plej grava novaĵo: La estraro de EAF iniciatis kolektadon de nomoj por petskribo, sendota al la Registaro, por deviga instruado de Esperanto en lernejoj. Lastjare Esperanto estis instruata almenaŭ en du lernejoj libervole, nome en la geknaba lernejo de Somero kaj en la popola lernejo de Kalalampi.

*H. S.*

---

## Kompreneble vi vizitos Southend-on-Sea

Kiel fidela verdstelano, vi ja venos al Anglujo je la okazo de la XXX-a Universala Kongreso en Londono. Konsentite, ke tio dependos de kelkaj cirkonstancoj, financaj kaj aliaj! Sed vi certe havas la firman intencon veni, kaj vi strečos ĉiujn fortojn por efektivigi vian volon. Plej kredeble, do ni vidos vin en Londono.

Estante en la brita ĉefurbo, vi troviĝos ĉe rivero Tamizo. Tiu fama akvovojo fluas orienten, kaj sin verŝas en la Nordan Maron tra larĝa elfluejo. Tie, ĉe ĝia norda bordo, en provinco Essex, lokiĝas la bela moderna banurbo, Southend-on-Sea.

Kvankam la urbo evoluis relative moderne, tamen ĝiaj radikoj sin ŝovas profunde en la pasintecon. En Essex okazis sinsekvaj okupadoj de keltoj, romanoj, saksoj kaj danoj. En la jaro 894 p.K., la soldatoj de Reĝo Alfredo venkis la danojn en la Batalo de Benfleet, pelante ilin trans la sidejon de moderna Southend. En tiu ĉi landparto ankaŭ okazis multaj bataloj kontraŭ la danaj mar-rabistoj kaj piratoj. La Juĝtaga Libro, kompilita de Vilhelmo I en 1086, enhavas menciojn pri diversaj bienoj kaj komunumoj, kiuj nun estas partoj de Southend.

La ekesto de la urbo kiel sanigejo kaj libertempejo datumas de ĉirkaŭ 1794, kiam ĝi fariĝis laŭmoda marbanloko. En tiu tempo, kiam transportado de pasaĝeroj estis per ŝipo aŭ kalešego, Southend estis vizitata ĉefe de pli riĉaj homoj. Alveno de la fervojo en 1854 donis al la urbo fortan antaŭenpuŝon, kaj grade rezultigis ĝian nunan eminentecon kiel unu el la ĉefaj sanigejoj kaj vizitejoj de Anglujo.

La marbordejo apud la urbo dum malalta tajdo estas malkovrita, kaj ĝi dissendas plelj bonefikan formon de oksigeno. Pri tiu ĉi avantaĝo, kaj ankaŭ pro la fortikiga kvalito de la nordmara aero, kuracistoj sendas pacientojn al Southend de ĉiuj partoj de la Britaj Insuloj.

Hodiaŭ, Southend estas vizitejo posedanta belajn arboriĉajn krutaĵojn, kiuj dolĉe deklivas de la plialta promenejo ĝis la marbordo, kaj kiuj estas agrabligitaj per piedvojetoj, publikaj ĝardenoj, herbejoj kaj florbedoj. La marborda promenejo estas sep mejloj longa.

En suna vetero, la maro moviĝas super la varmigitan marbordejon kaj sablejon, tiel ke la akvo estas pli varma por banado, ol en la plimulto el marbordaj vizitejoj. La bordo estas el stablo kaj ŝtonetaĵo. Banado estas sendanĝera por plenaĝuloj kaj infanoj. Pro la ebeneco de la marbordejo, kaj la manko de fluoj en la akvo, la plialtiĝo de la envenanta tajdo estas malrapida.

En Southend troviĝas ĉiaj amuzoj kaj sportrimedoj, subĉielaj ka jsub ŝirmo de tegmento. Dum la someraj monatoj, plezurŝipoj veturas ĉiutage al diversaj aliaj anglaj marbordurboj; ankaŭ, je difinitaj tagoj, al Londono, Dundee, Boulogne, Calais, kaj Ostendo. La plej famaj militistaj kaj civilaj muzikistaroj ludas ĉiutage en la Krutaĵa Muzikistejo. La Marponto 2,540-metra, estas la plej longa en la Brita Imperio. Promenante ĉe ĝia fino, oni sentas sin kvazaŭ sur transoceana ŝipego.

Ĉi tiuj allogaĵoj estas facile atingeblaj de Londono, ĉar la vagonara veturado okupas nur unu horon. En pasintaj jaroj, multaj diverslandaj esperantistoj vizitis Southend'on. Espereble, dum la kongresa periodo ili profitos la okazon por rekonatiĝi kun ĝiaj ĉarmoj. Ankaŭ venu tre multaj novaj vizitantoj, portante surbruste verdstelajn insignojn!

Se vi volas havi pli detalajn informojn pri la urbo, petu alsendon de gvidlibro aŭ broŝuro (enhavanta esperantlingvan parton) de: The Publicity Officer, Urba Inform-Oficejo, Pier Hill, Southend-on-Sea, Anglujo.

D. P. B.

---

## Tiom arde amita...

**(Vous m'avez tant aimé)**

(Lorena rondkanto, el la franca tradukis : Henriko Gielb.)

Se vi, kamarado juna,
Volas edziniĝi,
Donu al knabin' instruon,
Kiel enamiĝi.

(Refreno): Tiom arde amita
Kaj nun forlasita.

Donu al knabin' instruon
Kiel enamiĝi;
Ĉarmulinon mi ekamis,
Sed ŝi ne komprenis. (Refreno).

Ĉarmulinon mi ekamis,
Sed ŝi ne komprenis;
Estis je vespermalfruo
Post la rendevuo. (Refreno.)

Estis je vespermalfruo
Post la rendevuo;
Sola mi sur stratpavimo,
Kaj ŝi — ĉe patrino. (Refreno.)

Sola mi sur stratpavimo,
Kaj ŝi — ĉe patrino,
Venu, ĉarmulin' anĝela,
Diru, buŝ' miela! (Refreno.)

Venu, ĉarmulin' anĝela,
Diru, buŝ' miela;
Ĉar se vorton vi ne diros,
Mi de vi foriros. (Refreno.)

Ĉar se vorton vi ne diros,
Mi de vi foriros,
Al la piej bela knabineto
En nia urbeto. (Refreno.)

Al plej bela knabineto
En nia urbeto:
Kiel freŝa rozburĝono
En flora ĝardeno. (Refreno.)

Kiel freŝa rozburĝono
En flora ĝardeno:
La knabin', burĝon' lilia,
Ŝi estiĝos mia...

# Internacia Esperanto-Ligo

**Centra Oficejo: Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo**

## Oficiala Informilo

**N-ro 76. 4-an de Majo, 1938.**

**NOVAJ DELEGITOJ.**

**Argentino.**

**Vicente A. Echeverria** (Santa Fe). — D.: F. De María, (F.C.C.C.)

**Ĉeĥoslovakujo.**

**Potŝtejn.** — D: L. Berger, N-ro 72.

**Nederlando.**

**Roosendaal** (Noord-Brabant). — FD. (Impostaj aferoj): A. Ebbinge, Brugstraat 49.

**Norvegujo.**

**Sandnes** (Rogaland). — D: J. Ellingsen, Storgaten 49.

**Usono.**

**Duquesne** (Pennsylvania). — D: I. L. Kinney, 38, First National Bank Building.

**ŜANĜOJ.**

**Brazilo.**

**Ĉefdelegito** — nova adreso: S-ro Mario Braga, Hotel Engert, ap. 48, Nova Friburgo (Est. Rio).

**Aŭstralio.**

**Hamilton.** — Provizore ne estas D. pro translokiĝo.

**Italujo.**

**Foligno.** — Provizore ne estas D. pro translokiĝo.

**Jugoslavujo.**

**Beograd.** — FD. (Arbarkulturo ktp.): M. B. Eric, nova adreso: Zahmuska ul. 28/I, apt. 7

**Polujo.**

**Brzesc n/B.** — Provizore ne estas D. pro morto de samideano Demidowicz.

**MEMBRO-SUBTENANTOJ.**

119. S-ro A. Cotton, Sèvres, Francujo.
120. S-ro F. L. Wharff, Los Angeles, Usono.

**MONATA STATISTIKO.**

**Membraro.**

Jen la stato de la pagitaj kotizoj ĝis la fino de Aprilo, 1938, kaj ankaŭ (por komparo) ĝis la fino de Aprilo, 1937.

| | Aprilo 1938. | Aprilo 1937. |
|---|---|---|
| AM | 4197 | 4218 |
| MJ | 928 | 738 |
| MA | 865 | 809 |
| MAH | 283 | 231 |
| MS | 121 | 131 |
| PAT. | 7 | 12 |
| DM | 72 | 73 |
| HM | 29 | 31 |
| Sumo | 6502 | 6243 |

**Korespondaĵoj.**

Centra Oficejo (sen la gazetoj) dum Aprilo, 1938:

| | |
|---|---|
| Ricevitaj | 705 |
| Senditaj | 1251 |
| | 1956 |

**UNIVERSALA KONGRESO, LONDONO 1938.**

Aliĝoj ĝis hodiaŭ: 1286 el 26 landoj.

C. C. GOLDSMITH,
Ĝenerala Sekretario.

**INTERNACIA KONKURSO 1938.**

**Stato je la 30a de aprilo 1938.**

| | POENTOJ 1937 | 1938 | % |
|---|---|---|---|
| 1. Jugoslavujo | 257 | 592 | 230.3 |
| 2. Svislando | 137 | 283 | 206.6 |
| 3. Bulgarujo | 92 | 181 | 196.7 |
| 4. Polujo | 318 | 544 | 171.1 |
| 5. Finnlando | 61 | 102 | 167.2 |
| 6. Latvujo | 55 | 91 | 165.5 |
| 7. Litovujo | 135 | 154 | 114.1 |
| 8. Belgujo | 1722 | 1528 | 88.7 |
| 9. Kanado | 74 | 64 | 86.5 |
| 10. Aŭstralio | 429 | 364 | 84.8 |
| 11. Nederlando | 2837 | 2334 | 82.3 |
| 12. Britujo | 6483 | 5230 | 80.7 |
| 13. Portugalujo | 317 | 243 | 76.6 |
| 14. Sud-Ameriko | 851 | 642 | 75.4 |
| 15. Hungarujo | 619 | 459 | 74.2 |
| 16. Usono | 1513 | 1057 | 66.6 |
| 17. Francujo | 5907 | 3937 | 66.6 |
| 18. Nov-Zelando | 265 | 162 | 61.1 |
| 19. Ĉeĥoslovakujo | 2449 | 1441 | 58.8 |
| 20. Afriko | 137 | 79 | 57.6 |
| 21. Danujo | 1118 | 633 | 56.6 |
| 22. Rumanujo | 50 | 27 | 54.0 |
| 23. Svedujo | 3024 | 1592 | 52.3 |
| 24. Italujo | 636 | 309 | 48.6 |
| 25. Aŭstrujo | 789 | 306 | 38.8 |
| 26. Norvegujo | 792 | 303 | 38.2 |
| 27. Azio | 1321 | 461 | 34.8 |
| 28. Grekujo | 137 | — | — |
| | 32525 | 23118 | 71.1 |
| | | | Meza % |

## OFICIALA INFORMILO N-RO 5.

**Kotizoj.** — De nun la kongreskotizo estas £ 1-10-0. La edzo aŭ edzino de kongresano, kaj gejunuloj ne pli ol 20-jaraj pagas po 15 ŝil. Pagiloj estu pageblaj al Internacia Esperanto-Ligo.

**Loĝejoj kaj Ekskursoj.** — Mendiloj estas jam senditaj al kongresanoj, kaj pliaj ekzemploj estas haveblaj ĉe la kongresoficejo. La komitato ne povas garantii loĝadon aŭ partoprenon en ekskurso al kongresano, kiu ne plenumas la kondiĉojn.

**Programo.** — La provizora programo jam aperis, kaj ni esperas sendi la kongreslibron al kongresanoj en junio. La jenaj novaj sciigoj, tamen, sendube interesos la legantojn:

Dimanĉo. — Multaj restoracioj en Londono estas fermitaj dimanĉe. Ni tial aranĝis komunan tagmanĝon por mil kongresanoj en Lyons' Oxford Corner House, tuj kontraŭ la Dominion Theatre, kie okazos la Solena Inaŭguro. La kosto estos 2ŝ. 6p., kaj biletoj estos haveblaj en la kongresejo tuj post via alveno en Londono. La ceteraj kongresanoj povos tagmanĝi en aliaj restoracioj sufiĉe proksime.

La Diservo okazos en The City Temple, granda preĝejo atingebla en dek minutoj de la restoracio supre-menciita. La Diservon kondukos Pastro W. H. Downes, bone konata kaj sperta angla samideano.

La Teatraĵo okazos lunde kaj marde en la Scala Theatre, Charlotte Street, W.1, tute proksime al la kongresejo. Ĝi estos komedio: «Eliza Restas» kiun prezentos la Neilson-Terry Guild of Dramatic Art, kies membroj nun kun aparta sukceso lernas Esperanton en Ĉeĥ-metoda kurso de f-ino Saxl. Duono de la kongresanoj ĉeestos la teatraĵon lunde, kaj duono marde. Je tiuj du tagoj, la kongresanoj, kiuj ne estos en la teatro, povos ĉeesti filmprezentadon en la kongresejo.

**Balo.** — La kongresa balo okazos Ĵaŭdon, en Alexandra Palace, kelkajn kilometrojn norde de la centro. Specialaj vagonaroj portos la kongresanojn al kaj de la balsalono. Bonvolu laŭeble kunporti nacian kostumon!

Vendredon vespere okazos nova aranĝo, kiu, ni opinias, plaĉos al la kongresanoj. En la Central Hall, Westminster, — unu el la plej grandaj koncertejoj en Londono — aro da tre lertaj infanoj el la Nacia Hejmaro kaj Orfejo por Infanoj prezentos al la kongresanoj allogan programon de kantoj, dancoj, kant-teatraĵetoj, korp-ekzercoj ktp.

**Fakaj Kunsidoj** estas aranĝitaj por Skoltoj, Bahaanoj, T.A.G.E., Katolikoj, Kvakeroj, la Unuigita Komitato por Impostoj laŭ la Valoro de la Tero, I.S.A.E., Komerco, K.E.L.I., Turismo, Aviado.

La kunsido aranĝata de la Kvakeroj estas granda kunveno sub la titolo « La Nuna Mondstato: Kiel Povas Esperanto Hodiaŭ Plej Bone Helpi al Mondfrateco kaj Internacia Paco ». Inter la parolantoj estos D-ro Edmond Privat.

**Karavanoj.** — Krom la jam anoncitaj, oni aranĝas la jenajn karavanojn:

Italujo: Itala Esperanto-Federacio, Galleria Vitt. Emanuele 92, Milano.

Nederlando: J. Telling, Schietbaanlaan 106a, Rotterdam.

**Membraro.** — Ĝis hodiaŭ (8-4-1938) aliĝis al la kongreso 1235 el 26 landoj.

**Blindula Kaso.** — La Organiza Komitato volonte ricevos donacojn por ebligi al blinduloj partoprenadon en la kongreso. Jam ricevita: £ 32-6-2.

F-ino E. Ashby, 118, Selly Park Road, Selly Park, Birmingham, Anglujo, organizas budon en la kongresejo, kie ŝi vendos diversajn objektojn por helpi al la Blindula Kaso. Tiuj, kiuj havas, aŭ povos pretigi taŭgajn aĵojn por tiu celo, estas petataj skribi al f-ino Ashby.

**Donacoj al la Kongresa Kaso.** — La Organiza Komitato volonte ricevos donacojn por helpi al la plena sukceso de la kongreso. Donacoj jam ricevitaj: £ 21-12-6.

**Presaĵoj.** — En la kongresejo kaj kongresaj kunvenoj oni rajtos disdoni cirkulerojn kaj ĉiajn aliajn preŝaĵojn nur post antaŭa aprobo de la kongresa komitato.

**Dokumentaro.** — La sama postulo rilatas al presaĵoj disdonotaj kun la oficialaj kongresdokumentoj; tio estas, ili devos ricevi la antaŭan aprobon de la komitato kaj devos alveni ĉe adreso indikota, plej malfrue du semajnojn antaŭ la kongreso.

**Adreso por leteroj.** — Sekretario, 30a Universala Kongreso de Esperanto, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

Por la Organiza Komitato,
Cecil C. Goldsmith, Sekretario.

*

**La belaj kongres-glumarkoj** estas ankoraŭ haveblaj ĉe la kongres-oficejo po 6 pencoj aŭ 2 internaciaj respondkuponoj por 50.

Poŝtkartoj de la Kongresejo estas haveblaj po 3 por unu penco, plus afranko, aŭ 12 por du respondkuponoj, afrankite.

# Esperanto vivas

**ĈEĤOSLOVAKIO.**

**Jarkunveno de Esp. Klubo en Košice**

okazis la 20.4. kaj elektis jenan komitaton: prez. J. Friedrich; vicprez. J. Fischhof; sekr. St. Szeemann; kas. Fr. Flossmann; revizoroj L. Králík kaj St. Maretta; anst. rev. J. Durnák; bibl. H. Berkiová; prot. M. Herhová; vickomitatanoj A. Krčmár, L. Krommerová, M. Nováková. El la pasintjara agado menciindaj estas: 3 paroladoj de J.R. Scherer en januaro (700 p.) kaj parolado de Kola Ajayi en novembro (200 p.). Nombro de klubanoj 70. La klubo ricevis ankaŭ pasintjare kulturan subtenon de la urbo (kr. 150.—). — El la ĝisnuna agado nunjara menciinda: aranĝo de Ĉeĥ-kursoj de H. Seppik kun 114 partoprenintoj.

**S-ino Seppik instruis germanajn gestudentojn en Neu-Titschein (Moravio).**

En tiu regiono sudetgermana (nomita Kuhländchen = bovinlandeto) s-ino Erika Seppik sukcese instruis laŭ Ĉeĥ-metodo 56 gestudentojn en la germana realgimnazio kaj en la porvirina faklernejo de Neu-Titschein, post propagando de s-anino Klara Peschke. Kunlernis ankaŭ direktoro kaj profesoro de la nomitaj lernejoj. La kursfina ekzameno konvinkis la inspektoron, ke la lernantoj bone progresis en la internacia lingvo.

**FRANCUJO.**

**Vigla verda vivo en Dunkerque.**

La 14.2. J. Baghy faris unikan prelegon en la urbdomo pri siaj travivaĵoj en Siberio. La 2.4. lumbildparolis s-ro Pragano pri sia patrolando Rumanujo, la 3.4. li legis kaj komentis literaturon: ĉiuj reiros lin aŭdi la 15.5., je 16.30, en hotelo Eole, 158 digue de mer. — La 23. kaj 24.4. vizitis nin s-ro Schwartz. — Meze de junio ni aŭskultos s-ron Krestanov, kiam li revenos el Islando, pri lia hejmlando Bulgarujo kaj eble pri liaj vojaĝoj. La 2.7. oni festos la grupfondiĝon en Rosendael aŭ Malo kun kantoj, teatraĵoj kaj balo; unu tagon poste kunvenos Nordfranca Federacio okaze de la oficiala inaŭguro de la Strato L.L. Zamenhof en Rosendael (proksime de Dunkerque), kun oficiala akcepto ĉe la urbestro ktp.; ĝi estos samtempe la inaŭguro de Internacia Semajno Libertempa kaj 4-a somera perfektiga kurso konversacia de SFPE, gvidota de nia sveda Ĉeĥ-instruisto Persson.

Dum somero okazos ĉiusabate je 19-20.30 amikaj babiladoj en unua etaĝo de Café Au Centre, Place Jean Bart; la 21.5. je 17.30-19.00 en restoracio Trassaert, rue Poincaré, amuza kunveno, kantoj, ludoj societaj. Trapasontoj bonvenaj. — Post kelkaj tagoj vizitos nin svisa samideano el Bern, kaj fine de majo venos hungara kantisto Sarossy.

**S-ro Pragano instruas kaj prelegas en Nordfrancujo.**

En Hénin-Liétard kaj Loos-en-Gohelle s-ro S. Pragano gvidas sukcesajn Ĉeĥ-kursojn por 78 partoprenantoj, inter kiuj multaj geinstruistoj. — En Desvres li faris prelegon kun lumbildoj por la lernantoj de s-ro Dumarquez, en la lernejo, pri Rumanujo. Simila prelego okazis en Dunkerque (vidu supre).

**NEDERLANDO.**

**Ĉiusemajne Verda Sabato en Groesbeek.**

Pensiono Groesbeek, proksime de Nijmegen, fariĝis rendevuejo de nederlandaj esperantistoj. Por la sezono 1938 estas aranĝita ĉiusemajna « verda sabato », dum kiu oni esperas aŭdi la paroladojn de diversaj samideanoj. La Esperanto-movado en la provinco Gelderland denove aktiviĝis.

**POLUJO.**

**Tevespero en Lwów.**

**Aŭdienco de esperantistoj ĉe episkopo.**

Societo « Esperanto » aranĝis tevesperon; amuzan referaĵon faris kluba sekretariino f-ino Mantel. La 14.4. okazis Zamenhof-vespero: solenajn vortojn diris prez. J. Toczyski, pianludis majstre direktoro de l' Lwów'a Muzikinstituto s-ro Fischler kaj s-ano Spiegel, niaj konataj recitantinoj f-inoj Minuŝka Mantel kaj Roma Kristian prezentis sin al la multnombra publiko, la vesperon gvidis s-ro mgr. Nato Herr. — Delegitoj de katolikaj esperantistoj s-roj Toczyski kaj Kucharz estas akceptitaj dum speciala aŭdienco ĉe lia episkopa moŝto sac. D-ro Eugeniusz Baziak, rektoro de Pastra Seminario de Lwów. Lia ep. moŝto favore parolis pri la Esperanto-movado kaj promesis subteni ĝin, helpante al la organizantoj de katolika Esperanto-movado en Lwów.

**Varŝovia Esperantista Societo**

(Leszno 56/9, Warszawa) apartenas al tiuj societoj, kiuj laboras sisteme, vigle. Konstante funkcias ĉe VES kursoj por komencantoj kaj progresintoj. Ĉiumarde okazas klubaj vesperoj. La biblioteko posedas ĉ. 600 volumojn. La societo funkcias lunde, marde, ĵaŭde kaj vendrede (20-22 h). Gastoj bonvenaj. — VES presigis 10.000 libro-enmetilojn kun propaganda teksto, kiuj estas disdonataj en multaj bibliotekoj de la urbo; krome 1000 cirkulerojn pri Esperanto, kiuj estas dissendataj al diversaj organizaĵoj. Sed la plej grava entrepreno estas **agado por instigi la polan Radion disaŭdigi en kaj pri Esperanto.** Tiucele estas presitaj specialaj folioj, enhavantaj lokon por 20 subskriboj de radio-abonantoj, postulantaj enkondukon de Esperanto. Societoj kaj samideanoj, kiuj ankoraŭ ne ricevis la folioj n, petu ilin de VES kaj tuj resendu ilin kun la subskriboj. Post kiam la nombro de kolektitaj subskriboj estos sufiĉe impona, VES prezentos la foliojn kun kunforma petskribo al la direkcio de « Pola Radio ».

**25-a Bulgara Esperanto-Kongreso en Sevlievo.**

La 25-a (Jubilea) Kongreso de Bulgara Esperantista Asocio okazos en la pitoreska verda urbo Sevlievo, la 16-18 julio. Sevlievo, situanta proksime de la legendeca montaro Balkano, estas facile atingebla per aŭtomobilo, ĉar tra ĝi pasas la grava malnova ŝoseo de Sofia al Ruse kaj Varna. Ĉiutagaj aŭtobusoj ligas Sevlievon al la proksimaj fervojstacioj. La Sevlievanoj estas gastamaj kaj servemaj — tion ili montris dum la pasintjara turista kongreso en tiu urbo.

La vivo en Bulgarujo, kaj speciale en Sevlievo, estas tre malmultekosta, — por nederlandanoj, belgoj, francoj, germanoj k.a. eĉ ridinde malmultekosta. Post la kongreso oni aranĝos ekskursojn en la pitoreska Balkano.

Por zorge aranĝota **Esperanto-ekspozicio** helpu tutmondaj gesamideanoj, per alsendo de leteroj, libroj, gazetoj, ilustritaj poŝtkartoj, fotoj el la esperantista vivo, ktp., por ke la bulgaraj amikoj brave kaj fiere flirtigu la verdan standardon.

Informojn kaj ilustritan gvidfolion pri Sevlievo petu senpage de gimnazia profesoro **Simeon St. Hesapĉiev, Sevlievo, Bulgarujo.**

# Dum unu maja mateno

Sunplena maja mateno. Silento sur hospitalaj koridoroj, silento ekstere, en la tuta naturo, silento en mia animo...

Printempo!

Rigardas min la ĉielbluo milde kaj serene; arboj, suŝutitaj per verda foliaro kaj burĝonoj, amike flustras ian rakonton, kiu portas al la animo trankvilon, grandan trankvilon.

Senzorge ĉirpas birdoj, — iras malproksimen ilia matena kanto, kanto de danko, pro l' suno, pro ĉielbluo, pro ĝojo...

Printempo! Printempo!

Sur la teron ĝi ĵetis faskon da varmaj sunradioj, alparolis ĝin per plugo, tondroj, per la unua tempesto, pasigis sur la firmamento diverskoloran ĉielarkon, elŝiris el la animoj malĝojon kaj dubon, ekkantis himnon de ĝojo...

Tra larĝe malfermita fenestro enpenetris ĝi en mian ĉambron, ekrigardis en miajn okulojn profunde, tre profunde.

Printempo.

Plorekĝemis mia animo en tiu ĉi maja mateno, ektremis forte mia koro... Ho, forlasi tiujn ĉi hospitalajn murojn, forkuri el tiu ĉi blanka lito, iri antaŭen, en tiun ĝojon kaj printempon, kuniĝi kun tiu printempa himno, himno de ĝojo kaj feliĉo...

Ho, printempo!

* * *

Mi eksidas sur la lito, forĵetas la kovrilon...
Doloro trapikas la koron...
Signalo!

* * *

Mi refalis sur la liton. El sub fermitaj palpebroj ekfluas larmoj...

Ho, suno! Printempo! Al vi mi etendas la brakojn!

Halina Weinstein.

En Universitata Kliniko, str. Nowogrodzka 59, ĉambro 91, Varsovio.

# Ĉeĥaj kaj sudetgermanaj gesamideanoj kunvenis sur monto Kozàkov

La 1-a de majo estas tradicia tago de nordbohemaj amikaj kunvenoj. Ankaŭ ĉi tiun jaron ambaŭ nacioj bohemaj sendis la verdlingvajn popolanojn por pace kaj amike interrilati en plena kompreno kaj respekto de unu nacio por la alia.

Dum altaj politikaj ondoj transveršas nian landon kaj faras ĝin la momenta centro de l' politika intereso, kelkaj... jes nur kelkaj, eble la solaj homoj pace migras en gaja aŭ serioza interparolado tra la ĵam floranta lando de la ĉeĥa paradizo, dum sur la germanaj limregionaj montoj ankoraŭ brilas la neĝo. Du naciaj lingvoj disigas la du indiĝenajn popolojn, kiuj ambaŭ samarde amas la komunan landon kaj pro ĝi malpacas, malgraŭ ke ĉiu en sia respektiva regiono povus libere kaj sen superrego ĝui la vivon.

Turnov estis la urbo de la renkontiĝo, kaj malgraŭ okaza pluvo kaj hajlado la gesamideanoj sekvis la deciditan vojon al la celo. Survoje ni « loktuŝe » trairis la vilaĝeton kun la ŝajne verdlingva nomo Loktuŝe. Post meztaga halto kaj ioma manĝo en Radostna oni serĉis la trovejon de bohemaj duongemoj kaj suriris la monton Kozákov, sur kies altebeno troviĝas bona hotelo, kie jam atendis aliaj gesamideanoj. En la gastĉambro la reprezentantoj de ambaŭ nacioj parolis verdlingve, kaj tio kompreneble vekis intereson ĉe la neesperantistaj gastoj, al kiuj oni per tio povis pruvi ke vera kaj justa samrajteco en internaciaj rilatoj nur estas ebla per uzo de internacia lingvo.

Ĝuinte per belecavidaj okuloj la ravan pejzaĝon, kiu sin sternas ĉirkaŭ la monto, oni adiaŭis kaj promesis kunveni la 28.8., post la mondkongreso, en Reichenberg.

Paca insulo estis la monto por ni, ĉeĥaj kaj sudetgermanaj geesperantistoj, kaj ni restu geamikoj ĉiam kaj ĉiam! — Ĉu ne?

B. G.

**UNUECO ESTAS FORTO!**

# Rido Sanigas

**Ŝi havas abonon.**

— Tiu junulo en la biblioteko vin kisis, ĉu ne?

— Jes, patrino.

— Ĉu tio okazas pli ofte?

— Kompreneble, patrino, mi ja havas abonon.

**La konsekvencoj.**

— Mi ne tiom timas la malsanojn, kiom iliajn eventualajn konsekvencojn.

— Jes, ankaŭ mi ne jam pagis mian kuracistfakturon.

**Lia scienco.**

— Mi metas mian tutan sciencon al viaj piedoj, sinjorino!

— Ĉu vi do estas sciencisto?

— Ne, pedikuristo.

**Informiĝo.**

— Kiel fartas via edzino?

— Sed, sinjoro profesoro, mi ja estas fraŭlo!

— Ho, jes; ĉu jam delonge?

**Interparolo.**

— Vi ne plus estas la fianĉo de Berta, ĉu?

— Ne.

— Kiamaniere vi sukcesis pri tio?

— Mi edzinigis ŝin.

# NI RECENZAS

(Unuoble ricevitajn verkojn ni mencias; duoble ricevitajn ni mencias aŭ recenzas.)

**Paul Neergaard: Terminaro hortikultura seslingva** (Esperanta, angla, dana, sveda, germana, franca) kun difinoj en Esperanto. — 29 p., 13,5 x 17,5 cm. Prezo 0.35 guld. plus sendkostoj. Eldonis SAT, 67 Avenue Gambetta, Paris.

Fakterminaroj apartenas al niaj plej gravaj eldonaĵoj, kvankam provizore ilia debito estas la plej malfacila. Tial meritas tiaj eldonaĵoj nian specialan atenton, kaj la eldonejoj, kiuj riskas ilian aperigon, meritas specialan laŭdon.

La hortikultura terminaro de Neergaard estas en sia unua parto aranĝita laŭteme, ĝi klarigas la Esperantajn terminojn per esperantlingvaj difinoj, aldonante parenteze la ekvivalentajn terminojn anglajn. La dua parto enhavas kvinlingvan terminaron, sen Esperanto, fotografe reproduktitan el Skandinava Enciklopedio Hortikultura. Do, la terminaro estas iom « hibrida », tamen uzebla, kaj uzinda.

Ne povas mirigi ke troviĝas en la libreto dudeko da neologismoj, kies plimulto ŝajnas neevitebla. « Forci » estus tre utila ankaŭ por la ĝenerala vortaro; mi jam ofte estis tentita uzi ĝin, sed mi ne riskis, timante esti ŝtonmortigota de tiuj kiuj estas pli Zamenhofaj ol Zamenhof. Anstataŭ « stuci » mi preferus « ŝtuci » (germane oni prononcas ŝtúcen).

La verketo povos utili al ĉiu « hortikulturisto » kiel ankaŭ al amatoroj de ĝardenkulturo.

M.

**Henrik Seppik: La tuta Esperanto.** Gramatiko por progresintoj. Gvidilo por kursestroj. — 184 p., 13,5 x 20 cm. — Eldonis Lit. Mondo, Budapest. Mendebla ĉe « Heroldo de Esperanto ». — Recenzo sekvos.

**« Pécs, Quinquecclesiae Sopianae »,** en pli frua tempo pli konata sub la germana nomo Fünfkirchen (= kvin preĝejoj) enviciĝis en la nombro de tiuj urboj kiuj eldonis esperantlingvan prospekton. Oni elektis la broŝurformon, kaj donas, sur 16 paĝoj (12,5 x 20,5 cm) kun kartona kovrilo, post historia superrigardo sufiĉe detalan priskribon ilustritan pri promenado tra la urbo. Ni ŝatus legi ankaŭ ion pri la nombro de loĝantoj. — Krome aperis ankaŭ **du faldprospektoj** en originala formo de leterpapero, kun artaj desegnaĵoj de nia samideano E. Gebauer kaj esperantlingva teksto: unu pri la urbo mem, la alia pli speciale pri solenaj ludoj religiaj (« Missa Sollemnis »). — La belajn propagandilojn oni povas ricevi senpage de: Idegenforgalmi Hivatal, Városhaza II. em. 74, Pécs, Hungarujo. Petu ilin per simpla poŝtkarto, esperantlingve!

**Esperantista libertempejo Láznê Bêlohrad, Ĉeĥoslovakujo.** — 4-paĝa prospekto kun 3 ilustraĵoj; teksto en Esperanto. — **Internaciaj Esperanto-Kursoj.** 6-paĝa prospekto pri la kursoj en L. Bêlohrad (10.-24.7.-1938), kun multaj laŭdesprimoj de vizitintaj gesamideanoj, kaj kun interesa vidaĵo de la Rokaro de Prachov. — Petu la prospektojn senpage de Esperantista Klubo, Láznê Bêlohrad, Ĉeĥoslovakio.

**La Unua Eŭkaristia Esperanto-Mondkunveno, Budapest 1938.** Glumarko 3,3x4,2 cm, verde kaj flave presita sur blanka papero, montranta blankan krucon kun la eŭkaristio antaŭ la verda stelo. Prezo por 12 ekz. 1 resp-kupono, ĉe Hungarlanda Katolika Esperanto-Societo, Petőfi Sándor-utca 9.IV.emelet 3.sz., Budapest.

**Esperanto, 18-a Kongreso de SAT, Bruselo, 7-13 aŭgusto 1938.** Glumarko en ruĝa kaj verda preso sur blanka papero. Havebla de la O.K.K.: L. Strainchamps, 148 Avenue du Roi, Bruxelles-Forest, Belgujo.

# Parolas la leganto

**Pinglo anstataŭ stelo ?**

(Vidu la artikoletojn en antaŭaj numeroj.)

Kiu nuntempe en nia lando ne kuraĝas porti la stelon, tiu certe ankaŭ ne kuraĝos porti pinglon. Krom tio oni tuj konjektus iun sekton, se pluraj personoj portus la saman insignon.

Mi ĉiam portas la verdan stelon, ĉar mi ne sentas min krimulo. Mi batalas por Grandgermanujo, por neŭtrala helplingvo, kontraŭ ĉiu fremdnacia lingvo-influo.

Kolonja nacisocialisto.

**Mi estas esperantisto.**

Ŝajne tial, ke mi estas « fervora esperantisto », mi ricevis de Institute Occidental cirkuleron pri tiu lingvo, — kio ŝajnas al mi ne tute logika, sed sendube la okcidentalistoj havas propran logikon. Nu, antaŭ ol resendi ĝin al la sendinto, mi skribis sur ĝin: « Ne malprudente kaj malutile perdu vian tempon kaj monon! Mi estas esperantisto. » Certe tre malĝentila respondo, ĉu ne?

Sovaĝulo.

# Gazetoj pri Esperanto

**Kaleva,** Oulu, Finnl., 24.4. Ĉiutaga ĵurnalo, publikigas tre detale pri la intereso, kiun vekis la trovo de Oranje-balonoj en Finnlando kaj la esperantlingva letero, kiun la redakcio de « Kaleva » direktis al la nederlandaj infanoj enaerigintaj la balonojn. Sur la 1-a paĝo kliŝo de la gazeteltondaĵoj, raportintaj pri la afero, kiujn la redakcio ricevis per Esperanto. La tuta 5-a paĝo grandformata enhavas ampleksan artikolon pri la sama afero, kun 8 kliŝoj.

**Gablonzer Tagblatt,** Gablonz, Ĉsl., 16.4. Kun art. « Kiel radio Jerusalem disaŭdigis paroladon de la asociestro de l' B.d.B. (Ligo de Germanoj) ». Temas pri tio, ke radio Jerusalem intencis relajsi iun Esp.-horeton de Brno, sed la Esp.-horeto estis prokrastita kaj anstataŭe je tiu tempo parolis la citita asociestro.

**List Říšského Svazu čs. Učitelek,** Praha, Ĉsl., 8.4. Kun Esp.-angulo de J. Šupichová, kaj kun noto pri Cseh-kurso de S. Pragano.

**Měsíční Zpravodaj,** Trebechovich, Ĉsl., marto. Kun Esp.-angulo de J. Šupichová. Ĉi tiu revuo, same kiel la antaŭe citita, estas pedagogiaj fakrevuoj.

# Ni funebras

— S-ro MARKO NEŠIĆ, malnova jugoslava pioniro de Esperanto, komponisto kaj gitarkantisto, konata sub la nomo « Ĉika-Marko » (onklo Marko), mortis en Novi Sad, Jugoslavio. Li ripozu pace!

En la venonta numero ni publikigos pri li pli detalan nekrologon.

— S-ino M. CVETLEROVÁ; membro de Esperantista Klubo « D-ro Schulhof » en Pardubice, Ĉeĥoslovakio, forpasis. Ŝi estis fratino de s-ino Ruzena Veverková en Pardubice, same kiel ŝi fidela kaj laborema anino de EAČSR, kiu antaŭ nelonge jam perdis sian edzon, amikon kaj favoranton de nia movado. Profundan kondolencon!

# Esperanto en Radio

**Radio Ljubljana**

ĉiun duan sabaton, je 23.00-23.10 h. MET, raportas pri la preparoj por la 20-a IKUE-Kongreso. La unua raporto okazis la 23.4., la dua la 7.5. Nun aŭskultu la 21.5., 4.6., 18.6. ktp. kaj, aŭskultinte, skribu al la stacio aŭ al la kongresaranĝantoj.

**Irlanda Radio**

kun siaj diversaj stacioj denove dissendis esperantlingve la 1-an de majo. Bedaŭrinde la informo atingis nin tro malfrue. Do, aŭskultu la venontan dissendon, kiu okazos la 5-an de junio, je 18.15-18.30. Auskultinte, skribu al Radio-Stacio, Dublin, Irlando.

**La sudetgermana radiostacio, Prag II,**

efektive akceptis la proponon provsendi en Esperanto kaj dum du horoj anoncis la koncernajn programerojn en nia lingvo, kaj petis la gesperantistojn-aŭskultantojn skribi al ĝi. La aranĝinto esperas, ke multaj gesamideanoj skribis kaj el malproksimaj regionoj raportis pri la ricevebleco de ondo 269.5 m. Kiu ne atentis la alvokon en Heroldo n-ro 16, bonvolu relegi ĝin. Multaj neesperantistoj atentis la esperantlingvan anoncadon. La stacio havas multajn aŭskultantojn en Germanujo kaj Aŭstrujo, kaj el ĉiuj regionoj de Eŭropo ĝi ricevis leterojn de germanlingvanoj. Esperantistoj ne postrestu! Ankoraŭ ne estas tro malfrue.

**IEL-delegito fariĝis estro de radio-stacio.**

La delegito en Hamilton, Aŭstralio, s-ro Frank S. Chamberlain, ĵus akceptis postenon kiel administranto de la radio-stacio 3.S.H. en Swan Hill, Aŭstralio kaj jam komencis disaŭdigi regulajn novaĵojn pri Esperanto kaj la movado. Lia nova adreso estas: Radio-stacio 3.S.H., 749, Campbell Street, Swan Hill. Ni kore gratulas nian malproksiman samideanon kaj deziras al li sukceson en lia nova ofico.

# Anoncetoj

**Geedziĝo.** La 18.5. geeedziĝos ges-anoj W. Böttcher kaj L. Reitsma en **Leeuwarden** (Nederlando); estonta adreso: P.C. Hooftstraat 25, Leeuwarden. — Ni kore gratulas!

**Kvin partoprenantoj de studrondo** deziras korespondi kun plej diversaj landoj. Esperanta Studrondo, Box 22, **Uppsala,** Svedlando.

**S-ro W. Lammers,** Berkenstraat 20, **Winterswijk,** Nederlando, kaj 4 filatelistoj deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, kvanto kontraŭ kvanto, kun ĉiuj landoj. Skribu multnombre! Ĉiam respondos.

**Aleksandro Laquer,** notario, bienkomisiisto, parolas germane, slave, france, Esperante, volonte estas je dispono de samideanoj vojaĝontaj Hungarujon. Adreso: Jókai-tér 1, földszint 4, **Budapest VI.**

**Neŭtrala Esperantista Asocio** (prez. Klimsza Emil), **Dolní Suchá 304,** Silezio, Ĉeĥoslovakio, aranĝos grandan Esperanto-ekspozicion en junio; ĝi do kore petas Esperanto-societojn kaj esperantistojn en- kaj eksterlandajn, bonvole sendi senpage por tiu ekspozicio afiŝojn, flugfoliojn, Esperanto-gazetojn, broŝurojn, librojn, libretojn, poŝtkartojn, glumarkojn ktp. Koran dankon anticipe!

**Henryk Sienkiewicz: Orso.** Restas al ni jam nur 27 ekzempleroj de tiu ĉi ĉarma rakonto de l' granda pola verkisto, kiun ni eldonis en 1933 en bela teknika prezento por donaci ĝin al niaj klientoj. La libreto neniam estis vendita. La lastajn ekzemplerojn ni donacos al tiuj, kiuj ĝis la fino de junio mendos libronjn ĉe nia Libroservo por minimume 2.— guldenoj. — Heroldo de Esperanto, **Scheveningen,** Nederlando. (507)

**Nur 30 cendojn,** inkluzive de sendkostoj, kostas la interesa rakonto de Friedrich Gerstäcker: « La ŝipĉarpentisto ». Gerstäcker estas la plej konata germana aŭtoro de aventurplenaj vojaĝaj rakontoj. « La ŝipĉarpentisto » havas kiel scenejon la Pacifikan Oceanon. La traduko estas bona. Ĉiu legos ĝin kun streĉa intereso. Hispana samideano J. Comella desegnis la titolbildon. Mendu ĉe la Libroservo de Heroldo, aŭ ĉe iu alia vendisto de Esperanto-libroj. (508)

**21-jara fraŭlino deziras korespondi** kun la tuta mondo pri diversaj temoj. Irma Pletichová, Havlíčkova 8, **Praha X,** Ĉeĥoslovakio

**Gramofondisko kun du arioj** el la operoj « Carmen » kaj « Rigoletto » kantitaj en Esperanto de tre bonaj kantistoj, mendebla pere de: Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, **Scheveningen,** Nederlando. — Prezo afrankite 2.— guldenoj. (491)

**MUUSSES ESPERANTO-BIBLIOTEKO**

**La kompleta unua serio (10 volumetoj) en praktika ujo por guld. 2,50, inkl. sendkostoj**

**HEROLDO DE ESPERANTO - SCHEVENINGEN** (506)

**Pasigu vian someran ferion, inter multaj Esperantistoj, en Helsingör, Danlando !**

**En la pasinta somero 210 personoj el 14 landoj.**

**16. - 24. de julio 1938 : Internaciaj Feriaj Esp.-Kursoj** (daŭriga, perfektiga kaj seminaria) **Nur 48,— d.kr. inkluzive plena pensiono.**

**15.-25. de aŭgusto 1938: 10-taga Ferio Esperantista** kun prelegoj de eminentaj Esperantistoj. **Nur 55,— d. kr. inkluzive plena pensiono.**

**Ĉiuj estos kore bonvenaj !**

Prospekto senpage havebla ĉe s-ro L. Friis, Thyrasvej 15, **Aabyhöj,** Danlando (495)

**Senpage** publikigas adresojn de **geknaboj,** kiuj deziras korespondi, la monata infangazeto « La Vojo ». Adreso Redakcio: Marathonweg 15, II., **Amsterdam,** Nederlando. (453)

**Nekatolikoj,** kiuj deziras informojn pri la katolikismo, senpage povas ricevi ilin de la Internacia Katolika Informejo: Fraterhuis, Vliert, **'s-Hertogenbosch,** Nederlando. (493)

# La Libro-Servo de Heroldo

konstante tenas stokon de ĉiuj libroj anoncitaj en ĝia Katalogo (eldono de Novembro 1937). Ĉi-sekve ekstrakto el tiu Katalogo. La prezoj estas indikitaj en nederlandaj guldenoj. Se oni mendas por minimume 1.— guldeno, ili entenas la sendkostojn. Se la mendo restas sub 1.— guldeno, oni aldonu en ĉiu okazo 0.05 guldenon por pako kaj afranko. Vidu niajn poŝtĉek-kontojn sub « Kurztabelo » en numero 7 (963) !

**Teatraĵoj.**

| | broŝ. | bind. |
|---|---|---|
| Akita. **Danco de skeletoj.** Tri teatraĵoj | 0.60 | |
| Azevedo (Couto Fernandes). **Amo per proverboj.** Unuakta komedio | 0.25 | |
| Boatman. **Jes, panjo!** Komedieto | 0.15 | |
| Brueys-Palaprat (Evrot). **Advokato Patelin** | 0.20 | |
| Calderón (Legrand). **La urbestro de Zalamea.** Dramo en tri aktoj | 1.20 | |
| Dahl. **Dialogoj kaj komedietoj** | 0.30 | |
| Giacosa (Padulli). **Sakludado.** Fama mezepoka teatraĵo | 0.25 | |
| Goldoni (Mevo). **Kurioza okazaĵo.** Triakta komedio | 0.60 | |
| Gual (Pujula-Valles). **Mistero de doloro.** Dramo | 0.50 | |
| Hebbel (Bischitzky). **Maria Magdalena.** Kvinakta burĝa tragedio | 0.55 | |
| Hiller. **Ho, tiuj fremduloj!** Opereto en unu akto, originale verkita en Esperanto | 0.50 | |
| Jamamoto (Cujuki). **En la nebulo.** Radio-dramo | 0.30 | |
| Kenngott. **Internacia dialogaro** | 0.45 | |
| Kenngott. **Internacia teatraĵetaro** | 0.45 | |
| K. R. (Devjatnin). **La Reĝo Judea** | 0.55 | |
| Lessing (Minor). **Natan la Saĝulo** | 0.50 | |
| Madách (Kalocsay). **Tragedio de l' Homo** | 1.40 | 2.10 |
| Minor. **Pro Dio, ne esperantiston!** Unu akto | 0.15 | |
| Molière (Legrand). **Amfitriono.** Triakta komedio | 0.50 | |
| Molière (Boucon). **La mizantropo** | 1.— | |
| Molière (Levin). **La nobela burĝo.** Kvinakta komedio | 1.— | |
| Privat. **Ginevra.** Triakta lirika dramo | 0.20 | |
| Pujula-Valles. **La rompantoj.** Kvin monologoj | 0.40 | |
| Rainis (Čače). **Amo estas pli forta ol morto.** Tragedio en kvin aktoj | 0.75 | |
| Richet (Couteaux). **Sokrato.** Kvarakta tragedio | 0.50 | |
| Romains (Corret). **Knock.** Triakta komedio | 0.75 | |
| Šalom-Alejĥem (Rabinovic). **Ĉe doktoro.** Monologo | 0.15 | |
| Shakespeare (Wackrill). **La Venecia komercisto** | 0.55 | |
| Shakespeare(Briggs). **Sonĝo de Someromeza Nokto** | 0.30 | 0.40 |
| Sinha. **Sivaĝi.** Originala dramo el la historio de Hindujo | 0.35 | |
| Strindberg (Engholm). **Pasko.** Dramo en tri aktoj | 0.85 | |
| Svjentoĥoski (Leono Zamenhof). **Aspazio.** Tragedio | 0.70 | |
| Thomson. **Multe pli la amo** | 0.35 | |
| Tolstoj A.(Hohlov). **La morto de Danton.** Tragedio | 0.30 | |
| Verga (Castagnino). **Cavalleria Rusticana** | 0.30 | |
| Werner (MEP). **Homoj sur flosglacio.** Komedio | 1.— | |
| Wolski (Grabowski). **Halka.** Opero | 0.40 | |

**« Nova Kulturo »**

(Tiu ĉi biblioteko prezentas ĉefe verkojn de Danov. Prezo de unuopa numero 0.25, duobla numero 0.50.)

1. **La alta idealo.**
2. **La Granda Leĝo.**
3. **La Blankaj Fratoj.**
4. **La kolektiva konscio.**
5.-6. **La nova homaro.**
7.-8. **La nova vivo.**
9.-10. **La fortoj en la viva naturo.**
11. **Jen la homo!**
12. **La talantoj.**
13. **La amo.**
14.-15. **La sonĝoj de Jozef.**
16.-17. **Paco al vi!**
18. **Fariseo kaj rompantisto.**
19.-20. **La timo.**
21.-23. **La nova Evo.**
24.-25. **La spirito kaj la karno.**

# Esperanto-kursoj en Esperantista Libertempejo

**Láznê Bêlohrad, Ĉeĥoslovakio**

**(10 Julio ĝis 24 Julio 1938)**

**Kurso por progresintoj. — Seminario por Cseh-metodaj instruistoj. — 14-taga restado kun kurskotizo nur 600.— Kč. (= 37.— nederlandaj guldenoj) — Detala propekto senpage de**

**Esperantista Klubo, L. Bêlohrad, Ĉeĥoslovakio.**

(498)

**Esperantan poŝtkarton** eldonitan de ĉeĥoslovaka poŝtministerio kaj prospektojn pri Ĉeĥoslovakio vi ricevos por unu internacia respondkupono de: Esperantista Klubo, **L. Bêlohrad,** Ĉeĥoslovakio. (499)

**Mi volas starigi Esperanto-movadon en Sud-Afriko,** kaj bezonas vian helpon! — Sendu al mi el la tuta mondo ajojn por Esperanto-ekspozicio! Antaŭdankon! — J. Semmeling, c/o Box 1246, **Pretoria,** Sud-Afriko (501)

**Filatelistoj!** Interŝanĝon de poŝtmarkoj deziras s-ino Fink, 41 Moulay Joussef, **Casablanca,** Maroko, peco kontraŭ peco, aŭ laŭ mankolisto, katalogo Yvert. Afranku per novaĵoj! (505)

Presejo de Belga Esperanto-Instituto K. S. Antverpeno — Belgujo.